A mia amiko C. Carl
C15

GVINEVERO

KAJ ALIAJ POEMOJ

DE

TENNYSON

TRADUKIS

C. BICKNELL

BORDIGHERA
STAB. TIP. P. GIBELLI
1907

GVINEVERO

KAJ ALIAJ POEMOJ

DE

TENNYSON

TRADUKIS

C. BICKNELL

701745-A

BORDIGHERA
STAB. TIP. P. GIBELLI
1906

GVINEVERO

EL LA IDILIOJ PRI LA REĜO

ARTURO, la Reĝo de Anglujo, en la sesa aŭ sepa centjaro.
GVINEVERO, la Reĝino.
LANCELOTO
MODREDO } Kavaliroj de la Ronda Tablo.
TRISTRAMO
ENID
VIVJEN } Sinjorinoj de la Kortego.
ISOLT
HENGISTO, Reĝo Saksa de Anglujo en la sesa centjaro.
GORLOIS, la Duko de Kornvalo.
AMSBURIO
KAMELOTO
USKO
TINTAĜILO Lokoj en Anglujo.
BUDO
BOSO
LIONESO
KORNVALO, Angla provinco.

La Angla Reĝo Arturo fondis la Kolegaron de la Ronda Tablo, kies kavaliroj devas esti viroj de nobla karaktero kaj de tre pura vivo, ĉiam pretaj por bataladi kontraŭ la nekristanaj malamikoj, kaj laboradi por la bono de la regno. Sed Gvinevero, la belega edzino de Arturo, amis Lanceloton, la plej estimatan el la kavaliroj, kaj ilia peko ruinigis la altan celon de Arturo. Kiam la peko estis malkovrita, ŝi forkuris kaj kaŝis sin en la monaĥinejo de Amsburio. Tie la Reĝo trovis ŝin, kaj reproĉinte ŝin pro ŝia malfideleco, diris adiaŭ. Ŝi, pentinte, poste estis elektita kiel abatino, kaj mortis.

GVINEVERO

El la kortego Gvinever', reĝino,
Jam estis forkurinta. Ĉe l'sanktejo
De Amsburio ŝi, plorante, sidis;
Kun ŝi nur fraŭlineto, novicino.
Lumeto unu inter ili brilis
Malheligita pro l' nebul' rampanta;
Ĉar ĝi, sub luno plena sed kaŝita,
Ekstere la senvivan teron kovris,
Simile al morttuko sur vizaĝo;
Kaj jen la tuta land' kvieta estis.

Ŝi, pro la Kavalir' Modredo, tien
Forkuris; ĉar li, kiel ruza besto
Kuŝante, kun l'okuloj al la trono,
Ŝanceton nur atendis por eksalti.
Por tia celo, li malvarmetigis
La popularajn laŭdojn pri la reĝo,
Per malaltigo aŭ ridet' silenta.
Kun Kavaliroj de l'Ĉevalo Blanka,
La nekristana gento kiun lasis
Hengisto, li intrigis; kaj li penis
La Rondan Tablon de Artur' disrompi

Kaj fendatigi ĝin per malpacegoj
Por sia cel' perfida; kaj malamo
Al Lancelot' akrigis ĉian agon.

Okazis tiel. En mateno Maja,
El la kortego ĉiuj, verdaveste,
Kun plumoj kiel floroj de kratago,
Revenis de l' kutima Maja festo:
Tiam, ankoraŭ en la verda vesto,
Modredo, nur okulo kaj orelo,
Surrampis l'altan muron de l' ĝardeno
Ian skandalon eble por spioni,
Kaj vidis la reĝinon kiu sidas
Kun Enid la korteganin' plej bona,
Kaj Vivjen la plej ruza kaj malbona;
Sed tion nur li vidis; Lanceloto
Trairis, kaj ekvidis lin kuŝantan,
Kaj, kiel ĝardenisto de l' brasiko
Forprenas ian verdan raŭpon, tiel
De l'muro kaj floranta herbetaĵo
Lin, je l' ~~talon'~~ Kalkan', fortiris Lanceloto
Kaj lin deĵetis teren, kiel vermon.
Sed eksciinte ke li estas princo
Kvankam malpurigita per la polvo,
Li, en malbona homo honorante
La reĝan sangon, kiel eble sin
Plej multe senkulpigis; kaj nobele
Li faris tion, sen malŝato ia.
Ĉar tiam estis kavalir' neniu
El la plej noblaj de Arturo, kiu

Okupis sin je malŝatado. Tamen,
Se iu estus ĝiba aŭ lamulo,
La homoj kiujn Dio kreis altaj
Kaj sanamcmbraj, al li malŝatadon
Permesis, kvazaŭ de difektoj liaj
Alian parton; kaj respondis dolĉe
Al li la Reĝ', kaj same sia Tablo.
Do Lancelot' la Princon helpis levi,
Kaj tiu-ĉi sin levis multefoje,
Genuojn siajn batis eĉ fortege,
Kaj tiam ekridetis kaj foriris.
Sed ĉiam poste, la perfort' malgranda
Al li farita, lin maltrankviligis,
Kaj mordis lian koron, kiel vento
Akrega kiu, dum la tuta tago,
Sulkigas la lageton apud ŝtono
Sur la dezerta bordo de la maro.

Sed kiam Lancelot' rakontis tion
Al la Reĝino, ŝi ekridis iom
Pro la enpolva falo de Modredo;
Sed poste tremis, kiel la vilaĝa
Edzino kiu kriis " Mi ektremaз,
Ĉar iu nun surpaŝas mian tombon ".
Tiam ankoraŭ ridis pli malmulte:
Ŝi preskaŭ antaŭvidis ke Modredo,
La ruza besto, ŝian kulpiĝecon
Nun serĉos ĝis li trovos ĝin, kaj ĉiam
Malestimata estos ŝia nomo.
De tiam ŝi malofte kuraĝiĝis

En la manĝejo aŭ en alilokoj
Rigardi la mallarĝan vulpsimilan
Vizaĝon de Modred', aŭ la rideton
Kiu la koron kaŝas, aŭ l'okulojn
Neŝanceliĝajn, grizajn ; kaj, de tiam
La Potenculoj kiuj pri l'animo
Zorgadas por difendi ĝiń de l'morto
Senmorta, kaj ĝin savi en la horoj
Teruraj, ŝin ĉagrenis kaj turmentis.
Tre ofte, dum kvietaj noktaj horoj
Apud la Reĝo pace elspiranta,
Vizaĝoj tre malbelaj venis kontraŭ
Kaj malaperis ; aŭ la konfuziga
Anima tim', simile al la bruo
Malcerta de krakantaj pordoj, kiun
Gardant' en fantomplena domo aŭdas,
(Kie postsignoj de mortigo restas)
Sendorman tenis ŝin: kiam ŝi dormus
Ŝi tre terure sonĝus, Tiam ŝajnis
Ke je la sunkuŝiĝo ŝi staradas
Sur vasta ebenaĵo, kaj de l'suno
Al ŝi rapidas io malbelega,
Kaj ĝia ombro antaŭiras, fine
Tuŝante ŝin: kaj tiam ŝi sin turnis,
Kaj jen! eĉ ŝ'a ombro, larĝiĝinta
El la piedoj, ankaŭ nigriĝinta,
La tutan landon glutas, kaj ekbrulas
La malproksimaj urboj. Kaj, kriante,
Vekiĝis ŝi. Sed tiuj turmentegoj

Ne ŝin forlasis, sed ja plimultiĝis,
Ĝis la vizaĝo klara de la Reĝo
Senkulpa, kaj fidemaj ĝentilecoj
De la vivado hejma, veneniĝis.
Do, fine, diris ŝi al Lanceloto,
"De tie-ĉi foriru vian landon,
Ĉar se vi restos. ni kunvenos ree,
Kaj se ni rekunvenos, tiam ia
Malbona sort' malkaŝos la skandalon
Nun fumetantan, kaj ĝin ekbruligos
Antaŭ la Reĝ', kaj antaŭ la popolo."
Kaj ĉiam li promesis, sed restadis.
Kaj ofte ili rekunvenis. Tiam
Ŝi diris "Lancelot', se vi min amas,
De tie-ĉi foriru." Tial ili
Decidis ke en ĝusta nokto, kiam
La bona Reĝo ne ĉeestos tie,
Kunvenos ili por adiaŭ fina,
Kaj ili, je pasio palaj, venis,
Salutis, kaj kun manoj kunplektitaj,
Kaj kun okulo al okul', sidiĝis
Sur la randet' malalta de l' kuŝejo,
Rigardegante ambaŭ, balbutante.
Adiaŭ fina kaj freneza estis!
Sed apud la piedo de la turo,
Modredo siajn atestontajn homojn
Kondukis, kaj kriante plenavoĉe,
"Elvenu, perfidulo, ĉar vi fine
Kaptita estas," vekis Lanceloton.

Kaj tiu-ĉi, simile al leono,
Ekkuris kaj eksaltis sur Modredon,
Kaj lin forĵetis teren, senkonscian.
Kaj la servistoj lin ~~ekprenis k~~kaj forportis,
Kaj ĉio kvietiĝis. Ŝi ekkriis,
"Jen, nun finita estas;" sed li diris,
"Kiel la peko estas mia, tiel
La honto mia estos; sed leviĝu,
Kaj tuj forkuru kastelegon mian
Transmaran, kaj mi tie vin kaŝados
Ĝis mia vivo estos finiĝinta,
Kaj vin protektos per vivado mia
Kontraŭ la tuta mondo" - Ŝi respondis,
"Ho! Lanceloto, ĉu vi tion faros?
Sed ne, amik'; ni jam adiaŭ diris:
Ho! Dio volu, ke mi povu kaŝi
Min de mi mem; la honto estas mia;
Edzino estis mi, sed vi nur fraŭlo.
Sed nun leviĝu; ambaŭ ni forkuros:
Sanktejon iros mi, kaj mian sorton
Atendos." Tial Lancelot', trovinte
Ĉevalon, sur ĝin metis ŝin, kaj prenis
La sian. Ili ~~tiam~~ al disiĝa vojo
Forrajdis, kisis unu la alian,
Kaj plore apartiĝis. Li, pro amo
Fidela al deziroj eĉ malgrandaj
De la Reĝin'. al sia land' reiris.
Sed ŝi, al Amsburi', la tutan nokton
Tra stepoj kaj kamparo dubeklaraj

Vojaĝis, kaj la ĝemojn de spiritoj
El la kamparo kaj la stepoj aŭdis,
Aŭ opiniis ke ŝi aŭdas ilin.
Kaj al si mem ŝi ĝemis "Tro malfrue!"
Tiam, simile al ĉiel-makulo,
En la malvarma vento de l'tagiĝo,
Fluganta korvo kriis, kaj ŝi pensis,
"Ĝi nun ekvidas kampon de mortigo:
La nekristanoj de la norda maro,
Logitaj per la krimoj kaj la pekoj
En la korteg', la landon dezertigas,
Kaj ankaŭ la popolon ekmortigas".

Kaj kiam ŝi alvenis Amsburion,
Ŝi diris al la monaĥinoj tie,
"Min sekvas malamikoj! min akceptu
Ho! paca fratinaro, en sanktejon.
Ne ekdemandu de la venintino
La nomon, ĝis ŝi volos diri ĝin."
Kaj ŝiaj ĉarmo, povo, kaj beleco
Al ili estis kiel talismano,
Kaj pri nenio ili ŝin demandis.

Do la Reĝin' majesta tie vivis
Semajnojn multajn kun la monaĥinoj
Sed nekonata, kaj en aparteco.
Ŝi, plena je doloro, nek malkaŝis
La sian nomon, nek de ili petis
Aŭ komunion, aŭ konfesodonon.
Sed kun la fraŭlinet' parolis, kies
Tre babilema senatento plaĉis,

Pro kiu ofte ŝi sin mem forgesis.
Sed, iun nokton, disblovita famo
Alvenis, ke la kavalir' Modredo
Uzurpis la reĝecon, kaj sin ligis
Kun l'aro nekristana, dum la Reĝo
Kun Lancelot' bataias; kaj ŝi pensis,
" Ho! kie! la popolo kaj la Reĝo
Deviĝas min malami," kaj sin klinis
Sur siaj manoj kaj silentis. Tiam,
La fraŭlineto, fine, la silenton
Ne tolerante, diris " Ho! malfrue!
Kioma horo estas? " Kaj respondon
Nenian ricevante, post momento
Kantetis ion kion ŝi ellernis
De l'monaĥinoj. "Ne, ne, tro malfrue".

Kaj, kiam la Reĝin' l' arion aŭ lis
Ŝi, suprenrigardante, tuj parolis
" Ho! Virgulino, se vi volas kanti,
Nun kantu, kaj malligu mian koron
Por ke mi ploru ". Tial, tre volonte
Ekkantis la malgranda novicino.

Malfrue, ha! malfrue! Kaj ni la nokton trovas
Malluma kaj senvarma: Ĉu ni eniri povas?
Malfrue, tro malfrue! Ne povas vi eniri.

Ni ĉiuj vere pentas, la lampojn forgesinte,
Sed l' Edzo nin perdonos, pri tio sciiĝinte.
Malfrue, tro malfrue! Ne povas vi eniri.

Sen lamp'! malfrue! Nokto malvarma kaj malhela,
Eniron ho! permesu, por lumo tiel bela.
Malfrue, tro malfrue! Ne povas vi eniri.

Al l' Edzo tiel dolĉa, eniron, ho permesu,
Por ke piedojn Liajn - malfrue - ni karesu,
Ne, tro malfrue, ne! Ne povas vi eniri.

Kaj, dum ŝi kantis, la Reĝin' malgaja
Kun kapo en la manoj, memorante
La pensojn kiam ŝi unue venis,
Pasie ploris: do, la babilema
Malgranda novicino al ŝi diris
"Ne ploru plu, mi petas, noblulino!
La parolad' de simplulino, kiu
Obei lernis, sed nenion plu,
— Kaj se ŝi ne obeas, pentofaras —
Konsolu viajn doloregojn; ili
De peko ne devenas, mi certiĝas,
Koninte viajn ĉarmon kaj noblecon.
Komparu ilin je la Reĝĉagrenoj,
Kaj tiel pli malgrandaj ili ŝajnos.
Ĉar nun la Reĝo foririnta estas
Batali kontraŭ Lanceloto, kies
Kastelo forta la Reĝinon tenas.
Kaj kontraŭ li, Modred' - la perfidulo -
Kiun li lasis por prizorgi ĉion.
Ha! dolĉa Sinjorino, la doloro
De l' Reĝo pri li mem, pri lia propra

Reĝino kaj la regno, ja trioble
Pli granda ol la nia devas esti.
Mi dankas la sanktulojn ke mi mem
Ne estas nobla. Kiam ajn alvenas
Al mi ĉagreno, mi silente ploras,
Kaj ĝi finiĝas. Scias ĝin neniu,
Kaj miaj larmoj al mi bone faris.
Sed eĉ se la ĉagrenoj de l'malgrandaj
Egalus tiujn-ĉi de l' grandaj, tamen
Al grandaj aldonita estas nova
Doloro, kiu estas, ke ne povas
Nubokaŝite ili plori, kiel
Ajn multe ili volus silentiĝi.
Jen tie-ĉi en Amsburio oni
Nun babiladas pri la bona reĝo,
Kaj pri edzino lia malbonega.
Kaj se mi estus tia reĝo, tian
Reĝinon ja havante, tre volonte
Dezirus mi vuali ŝian krimon,
Sed, se mi estus Reĝo, mi ne povus".
Kaj tiam la Reĝino ekmurmuris
Al sia propra kaj malĝoja koro,
"Ĉu nun mortigos min la infanino
Per ŝiaj simplaj vortoj?" Sed ŝi laŭte
Respondis "Ĉu mi mem ne devus ankaŭ,
Se tiu perfidulo efektive
Okupis nun la lokon de la Reĝo,
Je la dolor' komuna partopreni?"
"Ha! jes!" la virgulino diris, "Tiu

Doloro estas por virinoj ĉiuj,
Ke estas ŝi virin', kies vivado
Tre malfidela konfuzaĵon kaŭzis
En la Artura Rondo Tablo, kiun
La bona Reĝo de tre longaj jaroj
En Kameloto fondis, eĉ kun signoj
Kun mirindaĵoj, ankaŭ kun mirakloj,
Antaŭ ol la Reĝino tien venis".
Tiam denove la Reĝino pensis
"Ĉu min mortigi volas l' infanino,
Per sia malsaĝega babilado?"
Sed laŭte diris, "Ho! novicineto,
Ĉirkaŭfermita per monaĥinejaj
Muregoj, kion scias vi pri Reĝoj
Kaj Rondaj Tabloj? Kion pri mirakloj
Kaj signoj krom la mirandaĵoj simplaj
Kaj la mirakloj de l' monaĥinejo?"
La babilema novicino diris
"Sed ja mi scias, ke la lando estis
Tre plena je mirakloj kaj je signoj
Antaŭ l'alveno de l' Reĝino. Tion
Rakontis mia patro, kaj li estis
Mem kavaliro de la glora Tablo,
Eĉ kiam ĝi apenaŭ ekfondiĝis.
Ĉar li de Liones' vojaĝis tien,
Kaj li rakontis ke, irante apud
La bordo de la maro, je l' unua
Aŭ dua horo post la sunkuŝiĝo,
Muzikon strangan aŭdis li; li haltis,

Sin turnis; kaj laŭlonge la dezerta
Marbordo Lionesa li ekvidis
La promontorojn, unu post alia,
Ekflami, ĝis la riĉa okcidento;
Kaj ĉiu supre fajron kiel stelon,
Kaj sube strangan maran lumon havis.
Kaj en la lumo blankaj marvirinoj
Naĝadis, kaj de l' maro iris fortaj
Estaĵoj, kiuj havis virajn brustojn,
Kaj tra la tuta lando kriegadis
Per forta mara voĉo. Feinetoj
Respondis el kavetoj kaj kavegoj,
Per voĉoj, al trumpeto malproksima
Simile. Tion diris mia patro,
Kaj plu: Ĉar kiam li eliris frue
Matene, tra l' arbaro duonhela,
Li mem ekvidis tri spiritojn gaje
Frenezajn, kiuj en la flanka vojo
Surĵetis sin sur altan floron, kiu
Sub ili tremis tiel kiel tremas
La kardo, kiam tri kardeloj grizaj
Batalas pro la semoj. Ĉiutage
En la vespero, antaŭ la ĉevalo,
Ekdancis kaj diskuris la feina
Lumanta bandφ, reunigis sin
Kaj tiam redancadis kaj diskuris;
Ĉar vivoplena la tutmondo estis.
Kaj kiam li alvenis Kameloton,
Aera rondo da dancantoj, kiuj

Unuiĝintaj per la manoj estis
Ĉirkau la brileganta lampo saltis
En la salono, kaj festeno tia
Okazis, kiel ja neniu sonĝis;
Ĉar ĉiu Kavaliro la manĝaĵojn,
Eĉ kiujn ajn deziris li, ricevis
Per manoj nevideblaj; kaj, malsupre,
Estaĵoj grasaj en la kelo gaje
La kranojn portis, kaj sur la bareloj
Sidiĝis, dum la vino forfluadis,
Ĉar homoj kaj spiritoj ĉiuj ĝojis
Antaŭ l'alveno de l'Reĝin pekonta".

Respondis iom akre la Reĝino:
"Ĉu estis ili ĝojaj? Tre neindaj
Profetoj estis homoj kaj spiritoj.
Ne povis ili antaŭvidi tion
Nun okazantan en la reĝolando,
Eĉ via patro per mirindaj signoj".

Tiam la babilema novicino:
"Jes, unu povis: estis li kantisto;
Rakontis mia patro, ke tre ofte
Li kantis ian noblan batalkanton,
Eĉ apud la ŝiparo malamika
Inter la ondoj kaj la landkrutaĵo.
Ankaŭ misterajn kantojn pri la vivo
Kaj pri la morto li tre ofte kantis
Sur la nebulaj suproj de la montoj.
Spiritoj apud li sin klinis, kies
Harar' rosplena estis radianta

Simile al la flamo en la vento.
Plu diris mia patro. Unu nokton,
Pri l'gloraj bataladoj de Arturo
Kantadis la kantisto, kaj pri li,
Ke la homaron preskaŭ li superas,
Kaj ridis li je tiuj kiuj diras
Li estas fil' bastarda de Gorlois.
El kie venis li, neniu scias,
Sed post ventego, kiam ondoj longaj
Laŭlonge la marbord' de Bud' kaj Boso
Tondradis, tago tiel paca kiel
Ĉiel' okazis: tiam oni trovis
Infanon nudan sur la sablo apud
Malbrila Tintaĝilo kaj la maro
Kornvala. Tio-ĉi Arturo estas.
Kaj oni tiam nutris lin, ĝis poste
Per mirindaĵoj li pruvita estis
La Reĝo. Ankaŭ lia morto estos
Tiel mistera kiel la naskiĝo.
Sed se li povos trovi la virinon
Kiu, pro sia virineco, estos
Al li egala, pro vireco lia,
La mondon ili ambaŭ reformigos!
Sed, je la kantomezo, la kantisto
Balbutis; lia mano de la harpo
Ekfalis; li paliĝis, ŝanceliĝis
Kaj estus ja falinta, se alia
Ne estus tie subtenintaj lin.
Vidaĵon sian li ne volis diri,

Sed ki : dubos ke li antaŭvidis
La pekon de l' Reĝin kun Lanceloto ? "
Ekpensis tiam la Reĝino; Jen!
La abatin', ŝajnanta simplulino,
Kun siaj monaĥinoj, ŝin instigis
Turmenti min; kaj ŝi la kapon klinis
Sed ne parolis. Kaj la novicino,
Kun siaj manoj kunigitaj, hontis
Pro sia babilado: sed babilis,
Dirante ke la monaĥinoj ofte
Haltigis ŝian babileman langon;
" Ho dolĉa Sinjorin' ", ŝi diris, " se
L' orelon kiu pro dolor ne volas
Aŭskulti, mi ĉagrenas neĝentile,
Per mia parolad kaj per rakontoj
Kiujn al mi rakontis mia patro,
Vi ankaŭ min haltigu nek permesu
Ke mi pri mia patro la memoron
Hontigu; ĉar li noblajn morojn havis,
Kvankam li diris ja ke Lanceloto
El ĉiuj havis la plej noblajn - Antaŭ
Kvin jaroj li mortiĝis, mortigita
En armil-ludo, kaj min lasis. - Tamen,
El ~~la ĉeteraj~~ kiuj restas, kaj precipe
El du pro ĝentilec' pli elnomitaj -
- Haltigu min, mi petas, se malbone
Demandas mi - kiu plej nobla estis,
Kiam vi mem kunvivis inter ili,
Ĉu Lancelot', ĉu nia Reĝa Estro?"

Kaj tiam la Reĝino paliĝinta
Suprenrigardis kaj respondis, "Kiel
Noblega Kavaliro, Lanceloto
Je ĉiu Sinjorino tre ĝentile
Kondutis, kaj en kampo de batalo
Aŭ en la armilludo ne rigardis
Profiton propran sian: kaj la Reĝo
En batalkampo aŭ en armilludo
La sian ne rigardis. Tial ambaŭ
Egale havis la plej noblajn morojn.
Ne sen deveno estas noblaj moroj,
Sed fruktoj de natur' fidela, kaj
Animo nobla. Tiam la knabino,
"Ĉu estas ili tia bela frukto?
Milfoje malpli noblaj devas esti
De Lancelot' la moroj, ĉar li estas
L'amiko, kiel ĉia famo diras,
Plej malfidela el la tuta mondo".

Al tio la Reĝin' malĝoje diris,
"Ho! vi, per la muregoj enfermantaj
De la monaĥinejo, ĉirkauita,
Kion vi scias, vi, pri nia mondo,
Pri ĝiaj ombroj, aŭ per ĝiaj lumoj,
Pri ĝiaj malbonaĵoj aŭ bonaĵoj?
Se iam Lancelot', la Kavaliro
Plej' nobla, montris sin dum unu horo
Malpli noblega ol si mem, preĝadu
Ke de la fajra sorto li saviĝu,
Kaj pro ŝi, kiu logis lin, ploradu".

"Por ambaŭ preĝas mi," la novicino
Respondis, "sed mi mem neniam kredos
Ke Lanceloto noblajn morojn havis,
Simile al la Reĝaj', aŭ ke vi
Mem havus tiajn kiajn nun vi havas
Se vi mem estus la Reĝin' malbona".

Simile do al multaj babiluloj
Anstataŭ trankviligi, ŝi turmentis,
Kaj vundis kiun ŝi sanigi volis.
Ĉar tuj elfluo de kolero varma
Ruĝigis la palecon de l' Reĝino,
Kaj kriis ŝi, "Ne estu, je eterne,
Fraŭlino tia kia estas vi,
Ilia senditino nur por moki
Kaj enuigi kaj turmenti min,
Ho! spionino kaj perfidulino!"
Kiam eksplodis tiu kolerego
El Gvinevero, la fraŭlin' leviĝis,
Terurigita, tiel blanka kiel
Vualo sia; antaŭ la Reĝino
Ŝi treme staris, kiel, en la vento,
La maroborda ŝaŭmo rompiĝonta
Kaj forflugonta. Kiam do "foriru"
Aldonis la Reĝino, ŝi forflugis.
Tiam l' alia, sola, ekĝemetis
Kaj, rekuraĝiĝinte, al si diris
"Nenion la knabin' timema, simpla,
Signifis: mia propra kulpiĝeco
Pli simpla ol infano, sin malkaŝas.

Sed, ho ĉielo, helpu min, ĉar certe
Mi pentas. Ĉu ne estas vera pento,
En pensoj plej internaj ne repensi
Pri pekoj kiuj al ni plezuradis
En tempoj jam pasintaj? Kaj mi ĵuris
Neniam plu lin vidi - plu lin vidi ".
Sed dum ŝi tion diris, el malnova
Kutimo de l' animo, la memoro
Ŝia reglitis al la oraj tagoj
En kiuj ŝi unue lin ekvidis.
Ĉar Lancelot', l'ambasadoro, venis
La kavalir' plej bona, kaj la viro
Plej bela en la mondo, por ke ŝin
Al sia ĉef' Arturo li konduku.
Kaj tiam li kondukis ŝin antaŭen
Tre malproksimen de la sekvantaro.
Per dolĉa kaj vivada parolado
Ravitaj, pri plezuroj, armilludoj
Kaj amo (Maja tempo estis, tamen
Pri ia peko ili ne ekrevis)
Rajdadis ili tra l'arbaroj kiuj
Ŝajnadis vera paradiz' floranta,
Kaj sur tapiŝoj de la hiacintoj
Kvazaŭ la teron la ĉiel' trarompis.
Antaŭen ĉiam ili vojaĝadis,
De unu monta supro al alia,
Kaj ĉiutage vidis, je tagmezo,
La silkajn tendojn de Arturo Reĝo,
En ia bela valo ordigitajn

De la senditoj antaŭenirintaj,
Aŭ por mallonga tagmanĝet', aŭ por
Ripozo posttagmeze; kaj ankoraŭ
Antaŭen ĝis la sunkuŝiĝo, kiam
Revidis ili la flamantan drakon
De la Pendrako* granda, kiu kronis
La ĉeftendegon de la Reĝo, apud
River' rapida aŭ silenta fonto.

Sed kiam la Reĝino en profunda
Revado, tra la tempoj jam pasintaj
Vagante senkonscie, tiun punkton
Atingis, kie ŝi unue vidis
La Reĝon sur ĉeval' proksimiĝantan
De l' urbo; pri l' vojaĝo finiĝinta
Sopiris ŝi, rigardis, kaj lin ĵuĝis
Malvarma kaj fiera, senpasia
Kaj sintenema, ne al la alia
Similaj, 'ne al mia Lanceloto' —
— Dum ŝi revadis tiel, kaj denove
Duonkulpiĝis ŝiaj pensoj, venis
Armita militisto al la pordoj.
Tra la monaĥinejo paroleto
Murmure kuris; poste la subita
Ekkrio "Jen! la Reĝo!" Ŝi sidiĝis,
Priaŭskultanta kaj rigidiĝinta.

---

* Pendrako estis la titolo donita al la antikvaj Britaj princoj, kaj drako estis la devizo sur iliaj standardoj. La Reĝo Arturo estis Pendrako. (Angle, Pendragon).

Sed kiam sonis tra la galerio
El la eksteraj pordoj, armobruaj
Piedoj, ŝi malsupren de la seĝo
Falinte teren, kun vizaĝo sia
Sur la pavim' kuŝiĝis, kie per
L'ombriga har' kaj laktoblankaj brakoj
Ŝi tute kaŝis ĝin de l' Reĝa vido.
Kaj ŝi, en la mallumo, la piedojn
Armitajn aŭdis, kie haltis li.
Tiam silento estis; poste voĉo
Malplena, unutona, eĉ simila
Al voĉo de fantomo kondamnanta,
Sed kvankam sanĝiĝinta, voĉ' de l' Reĝo.

"Ĉu kuŝas vi malalte, vi, l' idino
De l' viro honorita, sed, feliĉe,
Jam formortinta antaŭ via peko?
Ke vi ne naskis filojn, kiel bone!
La viaj idoj estas glavoj, fajro,
Ruino sanga, leĝoj disrompitaj,
Parenca perfideco, kaj sendiaj
Nekristanaroj de la norda maro.
Mi tiujn-ĉi, dum Lancelot' restadis
Kun mi, plej forta el la kavaliroj
Kaj mia brako dekstra, dekdufoje
En nia Krista land' plenege venkis.
Ĉu scias vi de kie nun mi venis?
De li, de tre kruela batalado,
Kaj kvankam li ne timis min ekvundi
Pli grave, tamen tian ĝentilecon

Li havis, ke la manon li ne levis
Kontraŭ la Reĝo lin nobeliginta;
Sed da nobeloj estis mortigitaj
Tre multe; k›j kun li sin unuiĝis
Parencoj ĉiuj kaj aliaj, kiuj
En lia propra lando kun li vivas.
Tiam Modred' ribelis, kaj plimultaj
Ekforgesinte fidelecon sian
Kaj ĵuron sian, kun li unuiĝis.
Sed kelkaj kun mi restas, kaj el ili
Parteton lasos mi kun vi, fidelajn
Amikojn kiuj amas min — pro kiuj
Mi ankaŭ vivas nun — por vin gardadi
En la estontaj kaj teruraj horoj,
Por ke nenia har' el via kapo
Ekinsultata estu. Ne timiĝu!
Gardata estos vi ĝis mia morto.
Mi tamen scias, se profetoj vere
Parolis, ke mi marŝas al la morto.
Vi mian vivon ne dolĉigis tiel
Por ke mi, Reĝo, plideziru vivi.
Ĉar vi de l'viv' la celon ruinigis.
Permesu do, ke mi, la finan fojon,
Eĉ por vi mem, klarigu vian pekon.
Kiam foriris la Roman', malmulte
Kunligis lia leĝo nin; la vojoj
Je krimoj estis plenigitaj, kvankam
Agadoj noblaj tie-ĉi kaj tie
Rajtigis iom da la malbonaĵoj.

Sed el la reĝoj mi l'unua estis
Kunligi la nobelojn nialandajn
Kaj ĉiulandajn kun mi, kiel estro,
En ~~du~~ Societo de la Ronda Tablo;
Kolegojn gloraju, virojn elektitajn
Kiel modelon por la mond' potenca,
Komencon belan por centjaroj novaj.
Mi igis ilin meti siajn manojn
En miajn, kaj ekĵuri honoradi
La Reĝon kiel konsciencon sian,
Kaj konsciencon kiel sian Reĝon;
Dispeli l' idolanojn, sed la Kriston
Subteni; malproksimen forrajdadi
Por rebonigi homajn malbonaĵojn;
Nenian kalumnion diri, nek
Aŭskulti ĝin; parolon sian propran
Honori, kiel Dian; en ĉasteco
Purega dolĉe vivi; ami nur
Fraŭlinon unu, kaj al ŝi sin ligi
Per noblaj agoj kaj dum longaj jaroj
Ĝis ili gajnos ŝin. Ĉar mi certiĝis
Ke ne ekzistas, sub ĉielo nia,
Potenco ia ajn pli forta, ol
Pasio de virgul' por virgulino,
Ne nur por subpremadi la malbonon,
Sed por ĩstrui noblajn pensojn, dolĉajn
Parolojn, ĝentilecon, kaj dezirojn
Por gloro, kaj la amon al vereco,
Kaj ĉion kio faras veran viron.

Kaj ĉio prosperadis ĝis la tago
En kiu mi edziĝis, kun la kredo
" Jen helpantino, kiu sentos mian
Celadon, kaj pri mia ĝojo ĝojos ".
Tiam okazis via honta peko
Kun Lanceloto; tiam poste venis
La peko de Tristramo kun Isolto;
Tiam aliaj, tiujn-ĉi plj noblajn
El miaj kavaliroj imitante,
Kaj el ilia bela fam' ekzemplojn
Malbonajn eltirante, ankaŭ pekis;
Ĝis nur la malaminda kontraŭaĵo
Al ĉio kion mia kor' intencis
Okazis. Ha! Kaj per vi ĉio estis.
Tial la perdo de la vivo, kiun
Mi gardas de dangero kaj de peko,
Kiel al mi la altan Di-donacon,
Ne estus grava. Mi prefere pensas
Kiel malĝoje estus - se Arturo
Ankoraŭ vivus - ke li residiĝus
En sia forlasita hejmo, kaj
Ne vidus tie la kutiman nombron
De siaj kavaliroj, nek aŭskultus
La altan paroladon pri agadoj
Noblegaj, kiel en la oraj tagoj
Antaŭ la peko. Ĉar el ni, restantaj,
Ĉu estus iu, kiu paroladus
Pri senmakula koro, ne ŝajnante
Ke li memoras vin. Kaj ĉe la laŭboj

De Usk' aŭ Kameloto, via ombro
El unu ĉambro al alia glitus,
Kaj per brodaĵ' pendanta, aŭ per ĉia
Lasita ornamaĵ', aŭ ĉia eĥo
Sur la ŝtuparo, de l' fantom-piedoj,
Mi estus de ĝi ĉiam vizitata.
Ne pensu, tamen, kvankam vi ne volis
Amadi' vian edzon, ke li estas
Perdinta tute por vi sian amon.
El tiaj malfortikaj elementoj
Ne estas mi farita. Sed mi devas
Vin lasi, ho! virin'! al via honto!
Mi kredas ke, el ĉiuj malamikoj
Publikaj, li la plej malbona estas,
Kiu, pro siaj idoj, aŭ si mem,
Por savi sian nomon de skandalo,
Permesas al l'edzino malhonesta
Ke ŝi en lia hejmo plu vivadu
Kaj regu: Ĉar. pro lia malkuraĝo,
Ŝi, kiun ĉiuj kredas esti pura,
Simile al malsano ia nova
Kaj nekonata, rampas tra l' amaso
Ne singardema; per okuloj siaj
La plej malbonajn fulmojn ŝi disĵetas,
L'amikan fidelecon ŝi sekigas,
Ekscitas en la sang' diablajn saltojn,
Kaj la duonon el la junularo
Venenas. Se do tia viro regus,
Li el malbonaj estus plej malbona.

Pli bonaj estus la dezerta hejmo
De l' Reĝo, kaj ĉagrena koro lia,
Ol vi residiĝinta en lumejo;
Malbeno, mokobjekto al popolo!"
Li haltis; kaj ŝi, dum la paŭzo, iom
Ekrampis pli proksime, ĝis ŝi tuŝis
Per siaj manoj la piedojn liajn.
Trumpeto sola malproksime sonis:
Kaj tiam, kvazaŭ pro amika voĉo,
Batalĉevalo lia ĉe la pordoj
Ekblekis; kaj ankoraŭ li parolis.
"Ne pensu, tamen, ke mi nun alvenis
Proklami viajn krimojn, Gvinevero!
Mi ne alvenis por malbeni vin:
Kompato mia vasta preskaŭ min
Mortigas, kiam mi rigardas tie
La oran kapon, kiu mia ĝojo
En la someroj pli feliĉaj estis,
Nun kuŝiĝintan je piedoj miaj.
Jen, la kolero kiu min devigis
Pripensi pri la tre kruela leĝo —
— La sort' pro perfidec' kaj flammortigo —
(Kiam mi sciis kie vi kaŝiĝas)
Pasinta estas. La doloro, kiu,
Dum mi komparis vian propran koron
Kun kor' alia tiel fidelega
Ke ĝi ne povis kredi vin malvera,
Bruligis miajn larmojn, estas iom
Pasinta; kaj pasinta estas ĉio;

La peko jam pekita! Kaj mi mem,
Jen, kiel la eterna Di' pardonas,
Tiel mi vin pardonas; la ceteron
Por la animo propra via faru!
Sed kiel diros mi la finan fojon
Al ĉio kion amis mi, adiaŭ'?
Ha! ora har' kun kiu alifoje
Mi ofte ludis, nesciante! Ho!
Skulptura imperia formo! Ho!
Beleco tia kian antaŭhavis
Virin' nenia, ĝis kun vi alvenis
Malbeno al la reĝolando. Mi
Ne povas tuŝi viajn lipojn: ili
Ne estas miaj, sed por Lanceloto:
Neniam ili estis por la Reĝo.
Ne povas mi ekpreni vian manon;
Ĝi ankaŭ estas korpo; per la korpo
Pekadis vi; kaj mia propra korpo,
Malsupren rigardante tie-ĉi,
Sur vian malpuregiĝintan, krias
"Mi tute abomenas vin". Sed tamen
Ho! Gvinevero (ĉar mi ĉiam estis
Virgulo krom por vi) amego mia
Tiele sin enteksis per la korpo
En mian vivon, ke - ha! sorto mia
Fatala! - mi nun amas vin ankoraŭ.
Ke mi ne amas plu, neniu songu!
Sed eble, se purigos vi l'animon,
Kaj vin apogos sur la nian Patron,

La Kriston; tiam, en alia mondo,
En kiu ĉiuj estos purigitaj,
Ni ambaŭ antaŭ l'alta Di' kunvenos,
Kaj vi al mi eksaltos, nomos min,
Akceptus min la via propra edzo:
Ne ian ajn animon pli malgrandan,
Sed min, ne Lanceloton, ne alian.
Mi petas ke vi lasu al mi tian
Esperon finan. Nun mi devas iri.
Trumpeto sonas en la densa nokto!
Oni alvokas, por ke mi, la Reĝo,
Nun forkonduku miajn militistojn
Al granda batalado malproksime
En l'okcidento. Tie nun mi devos
Militi kontraŭ li, la vir nomita
La mia nevo - Sed neniu estas
Parenco mia, kiu sin alligis
Al la nobeloj de l' Ĉevalo Blanka,
La nekristanoj, kaj al kavaliroj,
La perfiduloj, - kaj mortigi lin,
Kaj mi mem morton trovi, aŭ alian
Misteran sorton, kian mi ne scias.
Sed tie-ĉi restante, vi pri ĉio
Sciiĝos: sed neniam mi revenos:
Neniam kuŝos plu je via flanko,
Neniam plu revidos vin: - Adiaŭ-".

Kaj dum ŝi kuŝis sur la ter' ĉe liaj
Piedoj, l'elspirajon de la Reĝo
Ŝi sentis sur la kolo, kaj ekvidis

La manmovadojn kiuj benas ŝin.

Poste, ne plu aŭdante la piedojn
Armitajn, la Reĝin' sin levis, pala,
Kaj, pro malĝojo, al finestron iris.
" Se eble, ne vidite, mi nur povus
Vizaĝon lian vidi ", ŝi ekpensis.
Kaj jen! ĉe la pordego, sur ĉevalo
Li sidis, kaj la monaĥinoj ĉiuj
Kun lumoj, apud li malgaje staris.
Kaj tiam li, pri la Reĝin' ordonis
Ke ili gardu ŝin, kaj je eterne
Pri ŝi zorgadu. Kaj dum li parolis
Al ili, li mallevas sian kaskon
Sur kiu l' ora drako de Britujo
Fiksita estis: tial ŝi ne vidis
Vizaĝon lian, al anĝel' similan,
Sed vidis, de l' nebul' malsekegitan
Kaj de la torĉoj tie lumigitan,
La fajran drakon de l' Pendrako granda,
Kaj eĉ la nokto fajrvaporo ŝajnis.
Li turnis sin; kaj la nebul' lunbrila
En kiu grandegul-fantom' li ŝajnis
Iom post iom lin envolvis, kaj
Lin pli grizigis ĝis li mem ~~similis~~ nek estis
Nebulo antaŭ ŝi, fantom' iranta
Al sia sort' fatala. Tiam ŝi
Etendis siajn brakojn, kaj tre laŭte
Ekkriis: " Ho! Arturo! " Sed la voĉo
Al ŝi subite mankis; tiam, kiel

La rivereto, kiu, ekfalante
El la ŝtonego alta en l'aeron
Sin interrompis, sed en malsuprajo
Sin rekunigas eĉ pli forte, kaj
Brilante fluas tra la valo, tiel
Pasie ŝi komencis reparoli.

"Irinta, foririnta! Edzo mia!
Mortigi nun, kaj esti mortigota!
Per mia peko: kaj li min pardonis,
Sed mi ne povas iom ekparoli.
Adiaŭ? al adiaŭ' devis mi
Respondi ion, sed kompato lia
Sufokis min: la Reĝ', Sinjoro mia,
Fidela edzo mia foririnta!
Ĉu mi kuraĝas nomi lin 'la mia'?
La ombro de alia ligas sin
Al mi, kaj malpurigas min. Li mem,
La Reĝo, nomis min malpurigita!
Ĉu mi mortigos min? Ĉu tio helpos?
Mortigi mian pekon mi ne povas
Se la anim' animo estas; nek
Mortigi mian honton, nek finigi
Ĝin kune kun la vivo. El la tagoj
Semajnoj kreskos, kaj el la semajnoj
Monatoj venos; poste la monatoj
Sin multobligos kaj la jarojn igos;
La jaroj kune ruliĝintaj estos,
Kaj la centjaroj iĝos, sed eterne
La mia nomo estos nom' hontinda,

Ne devas mi tro pensi pri la venko
De l'fam'. La mondo estu. Tio estas
Nur de la mondo. Ĉu pretere io
Ekzistas? Ĉu espero ia estas?
Mi kredas ke espero estas; se
Li, parolante pri esper', ne mokis.
'Espero mia' li ĝin nomis. Tamen,
Li mem neniam mokis, ĉar la moko
Nur estas la kolero de koretoj
Kaj ho! benita estu li, la Reĝo,
Kiu, la pekon al mi pardoninte,
Al mi l'esperon donis ke mi povos
En mia propra kor' estingi ĝin,
Kaj antaŭ alta Dio en ĉielo
Edzino lia esti. Ha! ĝentila
Kaj nobla Edzo, kiu ĉiam estis
Por viaj kavaliroj, kiel estas
La konscienco por la batalantaj
Sentaĵoj de sanktulo. Mia falsa
Volupta fiereco, ricevinta
Impreson ĉian de malsupre tiel
Facile, ne suprenrigardi volis,
Aŭ duonmalestimis tian supron
Kiun mi ne deziris aŭ ne volis
Atingi. Ĉar mi kredis ke en tia
Aer' maldensa mi ne povus spiri,
L'alta pureco de perfekta lumo.
Varmecon kaj koloron mi deziris
Kiuj en Lancelot' trovitaj estis,

Nun, kiel estas vi, mi konas vin:
La vir' plej nobla, ankaŭ la plej homa,
Nek Lanceloto, nek alia. - Ha!
Ĉu estas ja neniu, kiu diros
Nun al la Reĝo ke mi amas lin,
Kvankam malfrue? - antaŭ ol li iros
Al la terura batalado? Ne,
Neniu! mi mem en la ekzistado
Pli pura devos diri ĝin, ĉar estas
Hodiaŭ tro kuraĝe! Dio mia,
De via bela mondo kiom mi
Nun estus profitinta, se mi estus
Aminta la estaĵon la plej noblan?
Ĉar mia devo estis la plej altan
Amadi; certe, ĝin sciinte, estus
Benita mi, kaj ĝin vidinte, mi
Feliĉigita estus. La plej altan
Vidante, ni necese devas ami
Nur ĝin, nek Lanceloton, nek alian".
Tiam sentinte ke la ŝiajn manojn
Iu ektuŝis, ŝi l'okulojn kovris;
Poste rigardis; kaj la novicinon
Plorantan kaj preĝantan ŝi ekvidis,
Kaj diris; "Ĉu mi mem, ho fraŭlineto,
Ne estas pardonita?" Kaj ĉirkaŭe,
La sanktaj monaĥinoj ĉiuj staris
Plorantaj; kaj kor' ŝia malligiĝis,
Kaj ankaŭ ŝi kun ili ploris. Tiam
Ŝi diris; "Ho! dolĉegaj virgulinoj,

Rekonas ni la pekulinon, kiu
havas econ de la Reĝ' nuligis.

Enfermu min per muroj ĉirkaŭantaj
De la monaĥinejo, de la voĉoj
Kriantaj, "honto, honto!"; mi ne devas
Min mem malŝati, ĉar li min amadas.
Ke li ne amas plu, neniu pensu.
Permesu tial, se vi ne tremegos
Pro mi, kaj ne malvole nomos min
Fratino, ke mi tie-ĉi nun vivu,
Min vestu en la nigrablankan veston,
Kaj, kiel vi mem, monaĥino estu;
Ke mi je viaj fastoj fastu; sed
Ne festu viajn festojn; ne malĝoju
Pri viaj ĝojoj, tamen ne ĝojegu;
Je la Diservoj viaj partoprenu,
Kaj preĝu, kaj ricevu viajn preĝojn;
Kuŝiĝu antaŭ la sanktejoj; faru
La plej humilajn devojn de la domo;
Promenu en ~~kiostro~~ Koridoj la malhela;
Donacu al mizeraj malsanuloj,
Kiuj pli riĉaj estas je l' okuloj
De la Elaĉetinto, kaj pli sanaj
Ol mi; kuracu la iliajn vundojn,
Kaj miajn proprajn resanigu; Tiel,
Per preĝoj kaj almozoj, mi atingos
La finon de l' volupta tago, kiu
La Reĝon, mian Edzon, ruinigis".

Tiel ŝi diris: ili ŝin akceptis.
Kaj ĉiam esperante, sed timante
"Ĉu estas tro malfrue?" ŝi kun ili

Loĝadis, ĝis la mort' de l'Abatino.
Kaj tiam ŝi, pro siaj bonagadoj.
La pura vivo, kaj regadkapablo,
Kaj ankaŭ pro la sia alta rango,
Por Abatino estis elektata.
Kaj tie ŝi, la Abatino, vivis
Dum tri jaretoj; tiam, Abatino
Ankoraŭ, iris tien kie preter
La niaj teraj voĉoj estas paco.

GODIVO

GODIVO.

En Koventrio mi la vagonaron
Atendis; kun ĉevalgardantoj
Kaj kun portistoj staris sur la ponto;
La altajn turojn de la tri preĝejoj
Mi rigardadis, kaj la jenon verkis
El la legend' antikva pri la urbo:

Ne sole ni, (de l'Temp la lastaj idoj.
La novaj viroj, kiuj dum radeto
Ruliĝas, l'estintecon ekmallaŭdas,
Kaj pri malrajtoj aŭ pri rajtoj krias),
Amadas vere la popolamason,
Kaj pro la ŝarĝ' de ĝiaj impostegoj
Koleras; sed ŝi faris plu, — suferis, —
— Kaj venkis, — ŝi, Godivo! — ŝi, (de kies
Vivad' someroj mil pasintaj estas)
L' edzin' de Graf' sovaĝa, kiu regis
En Koventrio. Kiam li imponis
Imposton sur la urbo, kaj alvenis
Patrinoj kun infanoj, ekkriante:
" Ni mortos pro malsato, se ni pagos ",

Ŝi serĉis sian edzon, kaj liin trovis
Ĉe la vestibulo, kie li promenas
(Hararo lia estis longa metron,
Kaj barbo duonmetron) kun la hundoj.
Ŝi priparolis pri iliaj larmoj
Kaj petis " Ili mortos pro malsato
Se ili pagos ". Li rigardis mire,
Kaj diris, " Vi ne volus ekdolori
Malgrandan fingron vian por ĉi-tiaj ".
" Sed mi por ili mortus " ŝi respondis.
Li ridis, kaj je Paŭl' kaj Petro ĵuris,
La diamanton en orelo ŝia
Tuŝante, kaj " Vi nur babilas " diris.
Sed ŝi, " Do provu, ion ajn mi farus ".
Kaj li, el koro tiel raspa kiel
La man' Esaŭa, diris " Rajdu nuda
Tra l'urbo, kaj l'imposton mi forprenos ".
Kaj tiam, salutinte, pro malŝato,
Li tuj, kun la hundaro, forpaŝegis.
Ŝi sola restis, kaj l'animpasioj,
Simile al ŝanĝemaj ventoj kiuj
El ĉiu ajn ĉiela loko blovas,
Batalis inter si, dum unu horo,
Ĝis la kompato venkis. Ŝi forsendis
Heroldon, por ke li per voĉ' trumpeta
Anoncu la kondiĉon gravan; tamen
Ŝi volas liberigi la popolon,
Kaj tial, se ĝi amas ŝin sincere
Neniu ĝis tagmezo, promenadu,

Nek ŝin pasántan en la strat' rigardu,
Sed ĉiu hejme restu, eĉ ferminte
La pordojn kaj barinte la finestrojn.
Ŝi tiam kuris al ĉambret' interna,
Kaj de talio sia ŝi malligis
L'aglon duoblan, de la Graf' donacon.
Tamen, je ĉia elspiraĵ' ŝi haltis,
Ŝajnante lun' somera en la nuboj
Duonkaŝita; poste, sian kapon
Ŝi skuis, kaj l'ondoliniajn buklojn
Ŝi lasis fali ĝis genuoj siaj,
Rapide senvestigis sin, malsupren
Per la ŝtuparo glitis, kaj simile
Al sunradi' rampanta, tra l'kolonoj
Paŝetis, ĝis la pordon ŝi atingis.
Kaj tie staris la ĉeval' bridita,
Kun vest' purpura kaj insignoj oraj.
Kaj, je ĉastec' vestita, ŝi forrajdis.
Ĉirkaŭe la aero aŭskultadis;
Ventetoj, pro timec' apenaŭ spiris;
L'okuloj ruzaj de la figurajoj
Kun larĝaj buŝoj, sur la pluvotuboj
Rigardis; hund' bojanta ŝian vangon
Ruĝigis; eĉ la paŝo de l' ĉevalo
Skuetis ŝiajn nervojn, kaj la muroj
Je truoj kaj fendetoj plenaj ŝajnis,
Kaj supre la tegmentoj strangaformaj
Ŝin rigardadis. Tamen, malgraŭ ĉio,
Daŭrigis ŝi, ĝis fine ŝi ekvidis

Trans la pordeg' Gotika en la muro
La blankajn florojn de l' sambuk-arbetoj.
Kaj, je ĉastec' vestita, ŝi rerajdis.
Sed iu malbonulo kaj malnobla,
De ter' ~~mal~~sen danka elfarita, kies
Hontinda nom' por ĉiuj jaroj daŭros,
Borinte truon, time ekrigardis.
Sed antaŭ ol laŭ sia vol' li agis
L'okuloj sekiĝintaj mallumiĝis,
Kaj falis antaŭ li el lia kapo;
La Potenculoj, kiuj servon faras
Al noblaj agoj, tiamaniere
x Nuligis tian senton maluzitan.
Sed ŝi, pri tio nesciante, pasis.
Tiam subite, per dekdu bategoj,
Cent turoj, unu post alia, tondris
Kaj sonoregis je l' tagmez' senhonta,
Kaj, ĉe l' momento, ŝi ĉambreton sian
Atingis; kaj, el ĝi reelirinte,
Vestita kaj kronita por renkonti
La Grafon; jen! l'imposton ŝi forprenis,
Kaj gloran nomon je eterne gajnis.

x malbonuzitan sentan nenuigis

INONO

INONO.

En Ido estas valo, pli belega
Ol iaj en la Ioniaj montoj.
Tra la valeto la nebul' naĝanta
Etendas sin, de pin' al pin' rampante,
Kaj malrapide pasas. Ĉiaflanke
Herbejoj kaj deklivoj riĉe brilas
Per floroj, kaj malsupre, malproksime,
Tra la fendego la river' muĝanta
Per kaskadaro saltas ĝis la maro.
Malantaŭ ĝi, Gargaro, l'alta pinto,
Atendas la tagiĝon, sed antaŭe
La val' plilarĝiĝanta, aperigas
Troason, kaj la fortikaĵ-kolonojn
De ĝia kron', Ilio.

Tien venis
Inono la malĝoja, je l' tagmezo.
Ŝi vagis, forlasite de Pariso
Kunulo ŝia foje sur la montoj.
Ne plu la vangoj estis rozkoloraj;
Hararo ŝia sur la kolo kuŝis:
Kaj, ripoz̆ante sur fragmento kiun

La brancoj de la vinberuj' cirkaŭis,
En la silento kantis ŝi, ĝis l'ombro
De la krutajo monta ŝin atingis.

" Ho! Ido, Ido! de l' fontar' patrino,
Kaj mia! Ho! patrino kara Ido!
Aŭskultu min antaŭ la mia morto.
Car nun tagmez-kviet' la montojn tenas;
En la herbejo la akrid' silentas;
Lacertoj kiel ombroj sur la ŝtono
Ripozas, kaj dormadas la cigalo.
La ruĝaj floroj velkas, la lilio
L' abelon lulas; mi mem nur vekiĝas!
Larmplenaj estas la okuloj miaj
Mallumaj; amoplena mia koro;
Rompiĝas ĝi; la viv' min enuigas.

Ho! Ido, Ido! de l' fontar' patrino,
Kaj mia! antaŭ mia mort' aŭskultu!
Ho! tero! Ho! montetoj! Ho' kavernoj
En kiuj la serpent' malvarma kuŝas;
Ho! montaj riveretoj, min aŭskultu!
Filino de Rivero-Di' mi estas.
Aŭskultu, ĉar mi devas nun paroli,
Kaj per kantad' ĉagrenon mian tute
Esprimi, kiel tiuj muroj, kiuj
Leviĝis per muziko malrapida —
— Ekformiĝanta nubo — tial, eble
Dum mi parolas, mia koro iom
Forgesos la doloron plej ekstreman,

Ho! Ido, Ido; de l' fontar' patrino
Kaj mia, antaŭ mia mort' aŭskultu!
Mi sub la montoj, je l' tagiĝ' atendis.
La rosa supro de l' herbej' mallumis;
Malluma estis la mont-pino rosa.
Pariso bela, sed de kor' malbona,
Kaprinon kondukante (nigran, sed
Kun kornoj kaj piedoj blankaj) sola
De l' marĉo Simoisa suprenvenis.
Ho! Ido! antaŭ mia mort' aŭskultu!
El la fendego la torent' min vokis;
Kaj malproksime la matena lumo
La puran neĝon tuŝis. Kun okuloj
Malsupren rigardante, sidis mi;
Kaj li, kun brusto tiel blanka kiel
La stelo de' l' tagiĝo, movis sin,
De liaj ŝultroj leopardo-felo
Pendiĝis, sed hararo lia hela
Ĉirkaŭis lian frunton kvazaŭ Dian.
Kaj liaj vangoj estis brilaj kiel
La ĉielarko sur blovita ŝaŭmo.
Eksaltis tuta mia koro por
Karesi lin, antaŭ ol li alvenis.
Ho' Ido! antaŭ mia mort' aŭskultu!
Li ridis, kaj en sia blanka mano
Orfrukton Hesperian montris, kiu
Odoris kiel ambrosio. Dum
Rigardis kaj aŭskultis mi, ekfluas
Ĝis mia koro lia parolado.

" Inono mia, bela! Ho! Inono!
Animo mia! tiu frukto kies
Brilanta ŝelo portas surskribaĵon
' Por la plej bela ', por vi, ŝajne, estas.
Vi, pli ol ia ajn arbaro-nimfo,
El la montetoj Idaj, bela estas,
Pro gracieco kaj pro ĉiuj ĉarmoj ".

Ho! Ido! antaŭ mia mort' aŭskultu!
Per lipoj florsimilaj li min kisis,
Dirante, " Tiu estis sur la tablon
Ĵetita, ĉe l' salon' de Peleuso,
Kie la Dioj estis kunvenintaj.
Disputis ili, ' Kiu ĝin meritas? '
Iriso tamen, la piedrapida,
Al mi hieraŭ portis ĝin, dirante
Ke al mi, unuvoĉe elektita
Por juĝi, Hero, Afrodit', Palaso,
Hodiaŭ venos; ĉiu la premion
' Por la plej bela ' deziregas; Vi
En la kaveg' malantaŭ la tufbranĉo
De l' murmuranta pino, neaŭdite
Aŭskultos, nevidite ĉion vidos,
Kaj min, Parison, ~~juĝo pri Deinoj~~ ".

Denar-ingento."

Ho! Ido! antaŭ mia mort' aŭskultu!
Tagmezo estis! unu nub' arĝenta
Vagadis tra la pinoj de l' valflankoj;
Alvenis ili tiam al la laŭbo,
La verda laŭbo; Nudaj ili estis,
Kaĵ apud ili, kiel fajr', krokusoj

Ekfloris, amarakoj, asfodeloj,
Violoj kun lotosoj kaj lilioj.
Venteto spiris, kaj malsupre ĉie
Girlandoj de heder' kaj vinberujo
Surrampis ĝoje sur la tordan trunkon
Kaj kovris ĝin per beroj kaj per floroj.
Ho! Ido! antaŭ mia mort' auskŭltu!

Sur arbo-pinton pavo flugis; supre
Sur ĝi sin klinis ora nubo, el kiu
Odora roso malrapide gutis.
Tiam l'unuan fojon mi la voĉon
De Ŝi ekaŭdis, antaŭ kiu Dioj
Starigas riverence, kiam ŝi
Tra la ĉielo paŝas kiel lumo
Iĝanta pli brilega kaj pli hela.
Ŝi al Paris' proponis reĝpotencon,
Regadon eĉ sen kontrauaĵ', riĉecon
Plenegan por beligi reĝ-etaton,
El valoj kaj kamparoj grenoplenaj,
Kaj el minejoj de valor' senfina.
"Honoron, servon" diris ŝi, "depagojn
El multaj urboj kaj havenoj grandaj
Kun ŝipoj sur trankvila mar' kuŝantaj
Apud la fortikaĵoj kaj turegoj".
Ho! Ido! antaŭ mia mort' aŭskultu!
Ankoraŭ ŝi parolis pri potenco;
Potenco, la premio post agado;
Potenco, al okazoj plej konvena,
Naskita kaj kronita per saĝeco, —

" Kun la najbaraj reĝoj interligo
Kaj fideleco, ĝis la via mano
De l' skeptro falos — kaj, de mi, Reĝino
Ĉiela, devus esti akceptinda
Donaco tia, ho! Paris'! al vi
La fil' de reĝo kvankam nur paŝtisto.
Ĉar nur la potencul' similas Diojn
Kiuj atingis ripozejon dolĉan,
Kaj trankvilecon super la tondrado,
Kaj nemorteman ĝojon pro la scio
De sia propra povo superega ".

Ho! Ido! antaŭ mia mort' aŭskultu!
Ŝi ĉesis, kaj Pariso sian brakon
Forstrecis kun la multekosta frukto,
Tiom la revo pri potenc' lin flatis.
Palaso tamen, atendante staris,
Kun bronza lanco kontraŭ sia ŝultro,
Kaj per okulo sia serioza
Rigardis super sia blanka brusto
Kaj vango kolerema; tiam diris;
" Memfido, memsciado, memkontrolo,
Nur tiuj-ĉi kondukas al potenco.
Potenco nevokite venas; sed,
Vivadi laŭ regulo, ĝin obei
Sen timo, kaj, ĉar bono bono estas,
Sekvadi bonon sen pripensoj pri
La konsekvencoj, jen saĝeco estas! "

Ho! Ido! antaŭ mia mort' aŭskultu!
Ankoraŭ diris ŝi; " Mi per donacoj

Ne amindumas vin; donacoj ne
Min plibeligus; Vi, pri mi decidu,
Pro tio kio estas mi; kaj tiel
Vi scios, ke mi estas la plej bela.
Tamen, se vi, mortema, rigardante
Diinon senvestitan, povas juĝj
Pri l' belo, ne per memprofit' logite;
Certiĝu, ke mi amos vin fidele,
Kaj mia fortegec', al via sango
Ligita, vin fortigos, kiel Dion,
Kaj puŝos vin antaŭen dum vivado
De agoj, de konfliktoj, de danĝeroj,
Ĝis per agad' kapablo pligrandiĝos,
Kaj la volad', per spertoj kaj reguloj,
Atingos la perfektan liberecon ".

Ŝi ĉesis kaj Pariso ŝanceliĝis.
Ekkriis mi, " Ho! donu ĝin al ŝi ".
Sed li ne aŭdis, aŭ ne volis aŭdi.

Ho! Ido! de l' fontaro la patrino,
Kaj mia, antaŭ mia mort' aŭskultu!
La Idalia Afrodito, bela
Kiel la ŝaŭmo, freŝe baniginta
En Pafaj fontoj, per fingretoj rozaj
Hararon sian, oran, ambrozian,
De sia brust' kaj varma frunt' retiris
Sur siajn ŝultrojn kaj brilantan kolon.
Piedoj ŝiaj inter la violoj
Aperis rozkoloraj; ĉirkaŭ ŝi
Tra l'ombroj de la vinberujaj branĉoj

La lumo flirtis, dum ŝi movis sin.
Ho! Ido! antaŭ mia mort' aŭskultu!
Ŝi, kun rideto ruza en l'okuloj,
Kiel la antaŭsigno de triumfo,
Alproksimiĝis, dolĉe mumurante
" Edzinon la plej belan mi promesas,
Kaj eĉ la plej amantan en Grekujo ".
Ŝi ridis, kaj mi fermis la okulojn
Pro timo; tiam, rigardante, vidis
Parison kun la brako forstreĉita,
Kaj Heron kun okul' koleropiena
Sin ritirantan en la oran nubon.
Kaj mi nur sola restis en la laŭbo,
Kaj mi de tiu tempo sola restas
Kaj sola estos ĝis la mia morto.

Patrino! antaŭ mia mort' aŭskultu!
'Edzinon la plej belan?' kial 'belan?'
Ĉu mi ne estas bela? ĉar milfoje
Aminto mia al mi tion diris.
Mi, ŝajne, estas bela, ĉar hieraŭ
Sovaĝa leopardo kun okulo
Simila al la stelo de l'vespero
Kaj vost' ludema, en la herb' kuŝiĝis
Dum mi trapaŝis. Kial 'plej amantan?'
Ho! ve! paŝtisto mia! se mi povus
Per miaj brakoj ĉirkaŭpreni vin,
Kaj premi miajn lipojn sur la viajn
Kun kisoj kiel fruktoportaj gutoj
De roso, aŭ pluveroj de l'aŭtuno

Falantaj en la Simoisajn akvojn!
Ho! antaŭ mia mort', patrin', aŭskultu!
Oni alvenis kaj dehakis miajn
Tre altajn pinojn, kiuj kiel plumoj
La krutajn flankojn de l' fendego blua
Ornamis, kaj protektis la aglidojn
Inter la neĝa pinto kaj la blanka
Kaskado; kaj el kies densaj branĉoj
Aŭdiĝis je l' maten' la voĉ' neklara
De la panter' blekanta, dum mi sidis
Malsupre en la valo. Plu neniam
Inono, sola, vidos la nebulon
Vagantan inter ili; plu neniam
L'arĝentajn nubojn en la lunradioj
Kaŝantajn ilin, inter la rivero
Bruega kaj la tremetantaj steloj.
Ho! antaŭ mia mort', patrin', aŭskultu!
Mi volus, ie ajn en la ŝafejoj
Ruinigitaj de l'ŝtonĝ-fragmentoj
Falintaj el la montoj, ŝin renkonti,
L'Abomenindan, kiu seninvite
Alvenis al la bela festenejo
De Peleuso, kaj la oran frukton
Dejetis sur la tablon, kaj la ŝanĝon
Elfaris; por ke mi l'animon mian
Malkaŝu, kaj al ŝi libere diru
Ke mi ŝin abomenas tute, — ŝin
De Dioj kaj de homoj malamitan.
Ho! antaŭ mia mort!, patrin', aŭskultu!

Ĉu li ne juris ke li amas min?
Milfoje, en ĉi-tiu verda valo,
Sub tiu-ĉi monteto verda, eĉ
Sidante tie-ĉi kaj min tenante?
Ĉu li la sian ĵuron ne sigelis
Per kisoj, kaj per larmoj ĝin konfirmis?
Ho! ĝojaj larmoj, ne al tiuj-ĉi
Similaj! Ho! ĉiel' feliĉa! kial
Vi povas min rigardi? Kial vi
Ho! ter' feliĉa! povas min toleri?
Ho! morto! morto! vagadanta nubo,
Tro multe da malfeliĉuloj estas
Sur nia tero; La feliĉajn kiuj
Deziras vivi, lasu; mi petegas
Ke vi de mia viv' la lumon kaŝu,
Kaj mallumigu la animon mian
Por ke mi mortu; ĉar vi nun subpremas
La mian koron, la palpebrojn miajn
Subpremu ankaŭ, kaj min lasu morti!
Ho! antaŭ mia mort', patrin', aŭskultu!
Sed morti sola mi ne volas; pli
Kaj pli en mi formiĝas fajraj pensoj
Kies signifon mi divenas, kiam
Mi aŭdas nokte la mallaŭtajn sonojn
El montaj internaĵoj, alvenantajn
Kiel la paŝoj de pied' sur lano.
La malproksiman celon mi malklare
Ekvidas, kiel la patrin' konjektas
Pri la vizaĝ' de l'ido naskiĝonta.

De l'ido! — mi tremetas -- ĉar neniam
Mi, malbenita, naskos idon kiu
Ĉagrenus min pro patro-simileco.

Ho! antaŭ mia mort', patrin', aŭskultu!
Ho! ter' aŭskultu! Morti sola mi
Ne volas, pro la timo ke al mi
Ilia akre ĝoja rido venu,
Dum mi malgaje paŝas la senstelan
Malvarman vojon de la mort', lasinte
L'aminton mian kun virino Greka.
Leviĝos mi; al Trojo nun mi iros,
Kaj, antaŭ ol la steloj ekaperos,
Mi kun Kasandro stranga parolados.
Ŝi diras ke, apude, fajr' saltadas,
Kaj ĉiam ŝi armitajn virojn aŭdas.
Pri tio mi ne scias, sed mi scias
Ke, kie ajn mi estas, nokte, tage,
La tero kaj l'aer' nur fajro ŝajnas.